Regularo

Pruntkondiĉoj

- La prunto estas senpaga, po 4 livroj por ĉiu pruntanto.
- La nomo kaj la kontaktindikoj de ĉiu pruntanto estas registrataj en dediĉa konfidenca kajero. Por nemembroj, legitimaĵo povas esti petata.

Daŭro de la prunto

- Libroj estas pruntedonitaj dum **kvar semajnoj**.

Rezervado kaj plilongigo

- La listo de la bibliotekaj libroj estas videbla ĉe nia retpaĝo, www.lastelo.ch
- Petu rendevuon per retmesaĝo (info@lastelo.ch) por konsulti kaj pruntepreni librojn ĉe la ejo de *La Stelo*, rue Carteret 19, 1202 Ĝenevo.
- Alimaniere, rezervu librojn (info@lastelo.ch) por ricevi ilin dum la kunveno de la *Lunda Grupo*, lundon de la 17:30 ĝis 18:30. Oni ankaŭ povas redoni ilin ĉe la sama loko laŭ rendevuo.
- Por plilongigi prunton, bonvolu sendi retmesaĝon al info@lastelo.ch antaŭ la limdato. Oni rajtas plilongigi la prunton dufoje, krom se la libro estas rezervita de alia pruntanto.

Libroj difektitaj aŭ perditaj

- Multaj el niaj libroj estas malnovaj kaj neretroveblaj. Bonvolu bone prizorgi ilin.
- La pruntitaj libroj estas la respondeco de la pruntanto. Bonvolu informi nin se iu libro estas difektita, kaj ne mem riparu ĝin.
- Se vi perdas libron, sciigu nin. Ni taksos la koston de la anstataŭigo.

Tiu ĉi regularo estas aprobita de la komitato de La Stelo, kiu rajtas modifi ĝin iam ajn.

Ĝenevo, la 26an de januaro 2024